

Komenio kaj Zamenhof - konciza komparo de iliaj planlingvoj

de Jindřich KOŠTÁLEK, Jince (CZ)

Eseo el postdiplomaj studoj de interlingvistiko, Universitato Adam Mickiewicz, Poznań (PL)

1. Enkonduko

Mia celo estas koncize priskribi (grandparte surbaze de citaĵoj) kaj kompari la ideojn de la ĉeĥa pedagogo kaj lingvisto Komenio (ĉeĥe Jan Amos Komenský, latine Johannes Amos Comenius) kaj tiuj de Zamenhof pri internacia lingvo. Ne iliajn meditojn pri la neceso de internacia lingvo, nek iliajn konsiderojn pri la elekto de nove konstruota lingvo anstataŭ lingvo ekzistanta (viva lingvo de iu nacio) aŭ "klasika" (la latina, greka aŭ hebrea) – sed iliajn konkretajn proponojn por krei novan internacian lingvon.

"... kontraŭ tiuj multnombraj malhelpoj kaj konfuzoj de reciproka rilato, kiuj ekestas el multnombreco, malfacileco kaj malperfekteco de la lingvoj, ne restas pli efika rimedo, ol konstrui novan lingvon, kiu superos ĉiujn jam konatajn lingvojn, estante

- 1) pli facila, por ke ni povu lerni ĝin sen perdoj tempaj kaj materiaj,*
- 2) pli belsona, por ke estu ĝoje lerni kaj ellerni ĝin,*
- 3) pli perfekta, tiel perfekta, kiel estas nur eble laŭ la karaktero de la aferoj...*

Ni sopiras do la lingvon

- 1) plene racian, kiu laŭ la fakta kaj formala vidpunktoj havu en si nenion alian ol tion, kio servas por esprimo de senco ĝis la plej malgrandaj detaloj,*
- 2) analogan, kiu enhavus en nenio neregulaĵojn,*
- 3) harmonian, kiu ne enportus inter aferojn kaj nociojn iujn misproporciojn, ĉar ĝi jam per la sono esprimus sencon kaj diferencigajn signojn de la aferoj. . ." ¹*

"La plej ĉefaj problemoj, kiujn estis necese solvi, estis la sekvantaj:

- ke la lingvo estu eksterordinare facila, tiel ke oni povu ellerni ĝin ludante.*
- ke ĉiu, kiu ellernis tiun ĉi lingvon, povu tuj ĝin uzi por la kompreniĝado kun homoj de diversaj nacioj ... " ²*

"... Esperanto bonege kontentigas ĉiujn postulojn, kiuj povas esti farataj al lingvo internacia (eksterordinara facileco, precizeco, riĉeco, natureco, vivipoveco, fleksebleco, sonoreco ktp.) ..." ³

¹ Komenio, Via lucis (Vojo de lumo)

² Zamenhof, Fundamenta Krestomatio, ĉapitro 6.1, Artikoloj pri Esperanto

³ Zamenhof, Fundamenta Krestomatio, Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia

La suprajn citaĵojn mi elpruntis el du verkoj, kies aŭtorojn disigas pli ol du jarcentoj: la unua estis skribita de Jan Amos Komenský (Komenio) en la duono de la 17-a jarcento en lia verko *Via lucis* (Vojo de lumo). En tiu ĉi verko li la unuan fojon priskribas la bezonon de komunikilo inter homoj de diversaj gepatraj lingvoj. Tiun ĉi ideon li poste pli detale priskribas en sia verko "Interkonsilo pri la reformo de homaj institucioj" (*De rerum humanarum emendatione consultatio catholica*) en ties kvina libro nomita "Panglotio: saĝa kulturado de lingvoj" (*Panglottia: sapiens linguarum cultura*).

Du sekvaj citaĵoj venas de la plumo de L. L. Zamenhof. En *Fundamenta Krestomatio*, en la artikolo "Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia", li priskribas la bezonojn, kialojn kaj vojojn al internacia komunikilo.

La komparo tamen ne povas esti kompleta aŭ definitiva. La kaŭzo estas la fakto, ke Komenio – male al Zamenhof – ne ellaboris kompletan projekton de lingvo. En *Panglotio* li nur priskribis la principojn, laŭ kiuj oni devus la novan lingvon ellabori.

2. Komparo de vortostoko

Mi komencos kun la ideoj de Komenio:

"Neutilajn vortojn ni forĵetu. ... Bazo de koncizeco estos, se ekzistos kiom eble plej malmultaj radikoj, ĉirkaŭ 200. Por objektoj plej ĝeneralaj, per kiuj eblas esprimi specialajn objektojn uzante diferencigan signon, proksimume 50 vortoj. Ne pli mi atendus da ĝeneralaj diferencoj (eksplikeblaj per adjektivoj). Agoj kaj statoj ne pli nombraj, nur la plej ĝeneralaj verboj. Adjektoj (esprimeblaj per prefiksoj) estos eĉ ne tiomaj; ili estos prenitaj el diferencoj inter loko kaj tempo. Se en ĉiu grupo estos kvindeko da signifoj (aŭ proksimume tiom), estos 200 (aŭ tricent) vortradikoj de la lingvo, plejparte unusilabaj el unu, du aŭ tri literoj; ĉiuj ceteraj vortoj estos kunmetitaj, kompreneblaj per si mem kaj portantaj signifon, eĉ se ekzistus miloj da ili. Vortoj plursignifaj kaj sinonimoj ne estos tolerataj. Ni ne aliros specialajn objektojn, sed restos ĉe la ĝeneralaj kaj necesaj. Ĉiuj objektoj de la sama genro havos komunan genran nomon; la specoj, enhavataj en la genro, estu esprimataj per la sama nomo kun diferenciga signo (afikso). Tiel ekzemple oni povos unuecigi nomojn de astroj, plantoj, metaloj, ŝtonoj, arboj, animaloj, vestaĵoj, konstruaĵoj ktp. kaj en la nomoj regos admirinda klareco.

Kiom da aferoj, tiom da vortoj, nek pli, nek malpli, kaj ĉiu nova afero havu novan vorton. Diferenco en la afero havu diferencon en la vorto. Do neniu vorto povas esti dugenraj. Por simpla afero simpla vorto; por kunmetita afero kunmetita vorto. Substanca afero donu al la vorto karakteron de substanco (substantivo, verbo), kvalito la karakteron de aldono (adjektivo, adverbo), manko la karakteron de malhavo (finaĵo, afikso). Diferenca kazo de la sama nomo aŭ diferenca formo de la sama verbo havu diferencon finaĵon, ke nenio koincidu kun la alia aŭ kaŭzu konfuzon en la kunteksto. Principo: kio ajn havas alian signifon, havu alian formon."

Kaj Zamenhof:

"... *Mi kreis regulojn por vortofarado kaj per tio ĉi mi enportis grandegan ekonomion rilate la nombron de la vortoj ellernotaj, ne sole ne deprenante per tio ĉi de la lingvo ĝian riĉecon, sed kontraŭe, farante la lingvon — dank' al la eblo krei el unu vorto multajn aliajn kaj esprimi ĉiujn eblajn nuancojn de la penso — pli riĉa ol la plej riĉaj naturaj lingvoj. Tion ĉi mi atingis per la enkonduko de diversaj prefiksoj kaj sufiksoj, per kies helpo ĉiu povas el unu vorto formi diversajn aliajn vortojn, ne bezonante ilin lerni. Pro oportuneco al tiuj ĉi prefiksoj kaj sufiksoj estas donita la signifo de memstaraj vortoj, kaj kiel tiaj ili estas lokitaj en la vortaro.*"

La teksto de la unua eldono de Unua libro, kies originala nomo estis *Международный языкъ. Предисловіе и полный учебникъ* (*Internacia lingvo. Antaŭparolo kaj plena lernolibro*), kaj vortaro de tiu ĉi Unua libro enhavis 947 radikojn, el kiuj 11 estis propraj nomoj.

Oni vidas, ke la aliro de Komenio kaj Zamenhof al la vortprovizo estis la sama (aŭ tre simila): por faciligi la lernadon, ili konsideris la bezonon krei (Komenio konsideris, Zamenhof kreis) koncizan radikaron bazitan sur la plej gravaj etnolingvoj (Komenio por ekzempligi siajn regulojn pri vortfarado baziĝis sur radikoj de latinaj vortoj) kaj por atingi riĉan vortprovizon ili ambaŭ uzis la vortkunmetadon: por krei vortojn surbaze de la radikoj, ili proponis (Komenio) / kreis (Zamenhof) liston de afiksoj.

Interesa estas ankaŭ komparo de baza radikaro ĉe ambaŭ aŭtoroj: Komenio proponas krei ducent ĝis tricent radikojn, Zamenhofa Unua libro enhavis 947 radikojn. Ĉe ambaŭ aŭtoroj vere limigita radikaro – sed por atingi plenan riĉecon de la lingvo, ili uzas afiksojn kaj regulojn por vortkunmetado.

Kaj Komenio kaj Zamenhof konsideris ilian lingvon ne nur kiel malriĉan komunikilon inter homoj, kiuj alie ne havus eblon interkomuniki. Ili volis lingvon riĉan, kapablan esprimi ĉion. Per la vortoj de Komenio "*... la universala lingvo devas esti el ĉiuj la plej riĉa, ĉiuflanke kontentiga, por ke ĝi taŭge sencotrafu ĉiujn aferojn kaj facile esprimu ĉiujn imagojn de la menso.*"⁴ Ili ambaŭ intencis lingvon, kiu fariĝu ankaŭ lingvo de beletro kaj de scienco kaj tiel ebligu aliri riĉecon de la kulturo en vasta senco al ĉiuj, ne nur al kleruloj. Ili ambaŭ konsciis, ke la lingvo laŭpaŝe pliriĉiĝos dank' al la reguloj de vortkunmetado kaj (ĉe Zamenhof) per aldono de novaj radikoj.

3. Pri gramatiko

Ni denove lasu unue paroli Komenion:

"*Verboj havas diversajn formojn laŭ personoj kaj laŭ tempoj. Tio estas senutila. Kial lerni diversajn finaĵojn? Por indiki la personon, sufiĉas simple la pronomo. Ni prenu la radikon de la latina verbo ... kaj ni konjugacios simple tiel, ke ni antaŭ la radikon metos personan pronomon. ...*"

⁴ Komenio: Vojo de lumo

Similan aliron li montras por la tempoj. Li proponas antaŭmeti signon de pasinteco *ante* (antaŭ) por la pasinteco, futuron oni kreas per signo de estonteco *post* (poste).

Kaj Zamenhof? Krom pronomo kaj radiko li uzas finaĵojn -as (prezento), -is (preterito), -os (futuro) por distingi personojn kaj tempojn.

Komenio kreus formojn transitivajn kaj netransitivajn de verboj ankaŭ per afiksoj. Zamenhof uzas en kelkaj kazoj sufiksojn (-ig-, -iĝ-), sed en plimulto de kazoj oni devas parkeri, ĉu la verbo estas transitiva aŭ netransitiva.

Interesa estas propono de Komenio distingi singularon kaj pluralon/ripetadon:

"Kio ajn estas sola (singulara), estu signata per vorto enhavanta unu vokalon, pluralo per duobligo de la sama vokalo aŭ (kio estas la samo) per streketo... Neniu vorto havu longecon en la radiko, sed ĉe ripetado: io (mi estas) - ió (mi estas), bor (arbo) - bór (arbaro), tar (bovo) - tár (bovaro)..."

Tiun problemon Zamenhof solvas pli racie (por eviti miskomprenon dum prononcado): "ripetado" (mi intence uzas la esprimojn de Komenio) ĉe verboj = -ad-; "ripetado" ĉe subjektivoj = -ar-.

Lastatempe, oni riproĉas al Esperanto seksismon. Ni ja scias, ke la inan formon de la vorto oni en Esperanto kreas per la sufikso -in-. Do la bazo estas vira genro, ina genro estas derivaĵo.

Ni aŭdu la proponojn de Komenio pri genroj:

"Genro estu unu, nomata neŭtra; sed kie ekzistas sekso, la vira genro konservas la aferan finaĵon kaj la ina ricevos certan signon, ekzemple -a: tar (virbovo) - tara (bovino), io (mi estas viro) - ioa (mi estas virino). Tamen la verboj ne estu supersarĝataj per la genroj, tio servas por nenio..."

Kiel solvus Komenio la deklinacion? Kiel li plifaciligus ĝin?

"Deklinacio estos tre simpla. La kazoj estu kvin: nominativo, genitivo, dativo, akuzativo, instrumentalo. Vokativo ne estas bezona, sufiĉas la nominativo. La deklinaciajn finaĵojn formos la vokaloj i, e, a, o. Estos do jena deklinacio:

mi: o oi oe oa oo ni: on oni one ona ono

ci: e ei ee ea eo vi: en eni ene ena eno

li: i ii ie ia io ili: in ini ine ina ino

Konforme al la pronomoj estos deklinaciataj ĉiuj nomoj. Ekzemple se "el" signifus "dio", kaj "ela" signifus "diino", ilia deklinacio estus jena:

el eli ele ela elo elon eloni elone elona elono

ela elai elae elaa elao elan elani elane elana elano"

Kiel ni vidas, Zamenhof estis eĉ pli "revolucia" – Esperanto havas nur du kazojn, nominativon kaj akuzativon. Ĉiuj aliaj "kazoj" (de kelkaj etnaj lingvoj) estas formataj per

prepozicioj. La solvo de pluralo estas simila ĉe ambaŭ: Komenio uzas finaĵon -n, Zamenhof -j.

Konjugacio de Komenio

"... *estu ĉe ĉiuj verboj sammaniera. Indikativo estu nura radiko kun signifo nedifina, t.e. prezenca, preterita kaj futura. Kaj kiel ni unuecigas vokativon kun nominativo, tiel ni unuecigu imperativon kun infinitivo, nur per aligo de pronomo: o, e, i; on, en, in. Se ekzemple i signifos esti, ni ricevos:*

oi - mi estu oni - ni estu

ei - ci estu eni - vi estu

ii - li estu ini - ili estu"

Kiel konate, ankaŭ Zamenhof havas sammanieran konjugacion por ĉiuj verboj. Sed kontraŭe al Komenio, li preferas diferencigi infinitivon kaj imperativon, uzante finaĵon -i por infinitivo kaj -u por imperativo.

Baziĝante sur la latina, Komenio proponas ankaŭ perfektan kaj imperfektan modojn por preterito kaj futuro, uzante pronomojn kaj prefiksojn. Do, pli komplika ol la lingvo de Zamenhof. Sed kelkajn liniojn malsupre Komenio skribas:

"... *Sed atentu! Ĉu ne estus pli bone preni kiel signojn de preteritoj kaj futuroj perfektaj kaj imperfektaj prepoziciojn aŭ adverbojn de tempo? ..."*

Do simila propono al la solvo de tiu ĉi demando ĉe Zamenhof...

Konjugacio ĉe Komenio kaj liaj ideoj pri kreado de verboj ŝajnas iom komplika por tiu, kiu ne scias la latinan:

"Antaŭ ĉio necesas elpensi tri bazajn verbojn (*subjektan, aktivan, pasivan - esti, fari, iĝi*), por ke ĉiuj ceteraj verboj povu esti formataj kaj konjugaciataj laŭ iliaj formoj, ekzemple:

I = esti o (mi estas) e (ci estas) i (li estas)

on (ni estas) en (vi estas) in (ili estas)

NI = fari no (mi faras) ne (ci faras) ni (li faras)

non (ni faras) nen (vi faras) nin (ili faras)

MNI = iĝi mno (mi iĝas) mne (ci iĝas) mni (li iĝas)

mnon (ni iĝas) mnen (vi iĝas) mnin (ili iĝas)

Laŭ ĉi tiuj tri oni kreos ĉiujn verbojn. Ekzemple el la interjekcio EN (jen!) ni ricevos jenajn verbojn:

eni - vidiĝi (jen esti)

enini - montri (fari jen esti)

eninimi - montriĝi (iĝi jen esti)

Ĉu ne eblus derivi de ĉi tie ankaŭ la verbon vidi? Ĉar vidiĝi, montri, montriĝi kaj vidi estas nocioj reciproke koneksaj. Sed kiamaniere? Tio tre kontribuas al la avantaĝoj, beleco kaj grava facileco de la lingvo. Ĉar la aliaj lingvoj ne konas ĉi tiun avantaĝon kaj konservis nur ĉe malgranda nombro da verboj (de tiuj tri signifoj) la saman radikon

(ekzemple en la latina: *albeo, albo, albes* = *mi blankas, mi blankigas, mi blankiĝas*); plej ofte ili uzas diferencajn radikojn (*pateo, appareo, video, ostendo* = *mi evidentas, mi aperas, mi vidas, mi montras*)...."

Kiel Komenio kreus radikojn de verboj? Jen lia propono:

"Ĉe verboj estu la radiko ĉiam unusilaba, trilitera, el vokalo kun du konsonantoj. La vokaloj *A, E, I, O, U* diferencigu la signifon de la verbo subjekta disde la aktiva, pasiva, aktiva-aktiva kaj aktiva-pasiva. Se ekzemple *ban* signifus esti, *ben* signifus estigi, *bin* estiĝi, *bon* igi iun estigi, *bun* igi ion estigita.

La radiko mem ĉiam validu kiel infinitivo, kun prefiksa pronomo kiel imperativo, kun sufiksa pronomo kiel indikativo. La tempojn ni distingos per la prefikso *F* por futuro kaj *P* por preterito kun la vokalo de la koncerna verbo. Ekzemple:

Prezenco: *bana, bane, bani; baná, bané, baní*

Preterito: *pabana, pabane, pabani; pabaná, pabané, pabaní*

Futuro: *fabana, fabane, fabani; fabaná, fabané, fabaní*

Aŭ:

Prezenco: *bena, bene, beni; bená, bené, bení*

Preterito: *pebena, pebene, pebeni; pebená, pebené, pebení*

Futuro: *febena, febene, febeni; febená, febené, febení*"

Ĉu la solvo de Zamenhof (uzi unu radikon el kiu oni povas per sufiksoj formi substantivon, verbon, adjektivon kaj adverbon) ne estas pli facila? Ĉu uzi radikojn "internaciajn" (aŭ similajn en la plej gravaj naciaj lingvoj) ne estas pli konvena por lernado ol inventi apriorie tute novajn radikojn?

Jen kiel Komenio pritaksas sian proponon:

"Jen, kian facilecon ni ricevas! Kaj tamen kian perfektecon kaj riĉecon! Konjugacio en tiu racia lingvo estos nur unumaniera, aŭ, pli precize dirite, nenia, estos nur tri pronomoj alfiksataj al la verba radiko entenanta signon de estado, farado aŭ suferado, en estanteco, estinteco aŭ estonteco."

4. Afiksoj, vortkunmetado

Pri uzo de prefiksoj kaj sufiksoj ĉe Komenio mi jam skribis supre. Li ŝatas afiksojn, uzas ilin ĉie, kie eblas, por krei novajn vortojn aŭ vortformojn. Sed li pluiras:

"Enkonduko de prefiksoj grandigaj, malgrandigaj, disigaj, monstrigaj, duobligaj, grupigaj estus enorma avantaĝo por la lingvo! Ekzemple povas signifi

a disigon (kiel ĉe la grekoj)

e ioman mankon

i malgrandigon

u grandigon

o streĉon, troecon, universalecon

Imagu, ke "mel" signifas parolanto; poste "amel" estos mutulo, "emel" balbutanto, "imel" beboblekanto, komencanto en parolo, "umel" vokanto aŭ krianto, "omel" ĉion diranto, babilemulo ktp. Se "bar" signifus kie, poste "abar" estos nenie, "ebar" ie, "ibar" apenaŭ ie, "obar" ĉie ktp., ktp., ĉar o pro rondeco de sia signo kaj pro rondeco de la buŝo ĉe elparolo taŭgas por esprimi cirklon, t.e. universon.

Simile ĉe nomoj kaj verboj. Se "lus" signifas lumon, "alus" estos mallumo, "ilus" ombro, "ulus" granda brilo, "elus" iom da lumo, "olus" la tuta lumo, t.e. lumradiado, brilego. Se "lal" signifus paroli, estos "alal" silenti, "ilal" flustri, "ulal" voki, kii, "elal" ion paroli, rakonti, "olal" ĉion rakonti, babilaĉi."

Ankaŭ ĉi tie oni vidas similan aliron de Zamenhof. Liaj afiksoj dis-, mal-, -et, -eg, -aĉ ktp. estas kompareblaj kun tiuj de Komenio. Komenio bone komprenis la forton de afiksoj. Ni lasu lin paroli:

"Ho, kiom grandega ŝparado! ... Ĉar kiel radikoj de tiu lingvo servos nur literoj aŭ silaboj du aŭ trilateraj (sed eĉ ne ĉiuj estos bezonataj!) laŭnombre ducent aŭ tricent; ĉiuj esprimos senpere la aferojn kaj manierojn de la aferoj. De ĉi tie ĝermos senlima kvanto da vortoj, sufiĉantaj por feliĉa esprimado de ĉiuj nocioj, eĉ en senfina kvanto. "

Same pensis Zamenhof. Ankaŭ por li la aglutina vortkunmetado (vortfarado per algluado de radikoj sen iu ajn ŝanĝo) estis la fundamento, sur kiu li konstruis gravegajn trajtojn de sia lingvo: la riĉecon de la lingvo, kiu estas uzebla kaj por beletro kaj por sciencaj verkoj, kaj samtempe ĝian facilecon por lernado. Sufiĉas ja lerni la radikojn kaj la afiksojn – kaj oni povas esprimi ĉiujn siajn pensojn. (Teorie – praktike oni bezonas pli da tempo ol tiu por lernado de radikaro kaj de reguloj de vortfarado por majstri la lingvon.)

5. Prononco, ortografio

Ambaŭ Komenio kaj Zamenhof havas la saman solvon: *"Ĉiu vorto estas legata, kiel ĝi estas skribita."*⁵

Sed ekzistas diferenco inter la alfabeto uzata de Komenio kaj de Zamenhof. Komenio uzas nur la latinajn literojn, kvankam Zamenhof aldonas al la latina alfabeto kelkajn literojn kun supersignoj: ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ. Kaj oni devas rekoni, ke kelkaj "ĉapelitaj" literoj povas kaŭzi problemojn de prononcado por tiuj, kies nacia lingvo ilin ne konas kaj ne uzas. Alia problemoj kun la supersignoj povas esti flanko teknika: ne ĉiuj presejoj (precipe en la unua epoko de la lingvo) havis ĉapelitajn literojn kaj nuntempe, ne ĉiuj komputilo (sen aldonaj kromprogramoj) ankoraŭ povas surekranigi ilin. Aliflanke, dank al "ĉapelitaj" literoj Zamenhof restis fidela al sia ideo *"unu litero, unu sono"*. Kaj la teknikaj problemoj estas nuntempe facile solveblaj.

⁵ Zamenhof, Plena gramatiko de Esperanto, la 9-a regulo

6. Konkludo

Ĉu oni povas fari kelkajn konkludojn surbaze de supre prezentita konciza komparo de proponoj de Komenio pri lia "lingvo universala" kaj de "lingvo internacia", kreita per Zamenhof?

- Por ambaŭ aŭtoroj grava estis facileco de la lingvo. Tion ili solvis tre simile – per granda plifaciligado de vortaro kaj gramatiko.

Mi ne sukcesis malkovri, de kie kaj kial Komenio prenis la radikojn de sia lingvo. Por ekzempligi siajn lingvajn proponojn li iam uzis latinajn kaj hebreaajn vortojn, iam radikojn tute elpensitajn. Zamenhof uzis "internaciajn vortojn", t.e. vortojn uzatajn en grandaj eŭropaj lingvoj. Kaj ankaŭ li elpensis kelkajn vortojn/radikojn (ekz. la korelativojn).

La koncizigo de la baza vortaro (pli ĝuste – radikaro) ili sukcesis kompensi per reguloj de vortfarado, uzante afiksojn. Per afiksoj oni povas krei longan vicon da vortoj kunmetante la radikojn, afiksojn kaj finaĵojn. Tiel oni disponas pri lingvo, kies riĉeco estas komparebla kun la plej grandaj naciaj lingvoj.

- Por ambaŭ aŭtoroj grava estis ankaŭ la reguleco de la lingvo. Lingvo kun gramatiko regula, senescepta, estas pli facile lernebla ol la lingvoj naciaj kun ilia historie evoluiĝinta gramatiko, plena de esceptoj.
- Kaj Komenio kaj Zamenhof penis krei lingvon belsonan, agrablan, kiu estus alloga por la lernantoj kaj uzantoj. Ĉu Komenio sukcesis, oni ne povas taksi, ĉar li ne kreis kompletan lingvon, li nur parte starigis ĝian bazon/regularon. Sed (elirante el liaj ekzemploj) mi opinias, ke la prononcado estus malfacila kaj ne ĉiam unusignifa. Kaj Zamenhof? Mia opinio la respondo al demando pri belsoneco (de iu ajn lingvo) estas tre subjektiva: al kelkaj Esperanto plaĉas kaj ili konsideras ĝin agrabla (ĝenerale esperantistoj), aliaj ne ŝatas ĝin pro diversaj kaŭzoj (ĝenerale neesperantistoj): iuj ne ŝatas la supersignitajn literojn, aliaj ne ŝatas la akuzativon, la finaĵon de pluralo ktp. .
- Resume, mia konkludo estas, ke la aliroj de Komenio kaj Zamenhof al kreado de nova lingvo estis tre similaj. Kiam mi legis kelkajn partojn de Panglotio kaj komparis ilin kun la lingvo de Zamenhof, altrudiĝadis al mi eĉ la penso, ke Zamenhof estis leginta tiun ĉi verkon de Komenio.

Sed ekzistas unu plia simileco inter Komenio kaj Zamenhof. Ili ambaŭ konsideris sian lingvon kiel instrumenton por plifaciligi la kontaktojn inter ĉiuj homoj, por plifaciligi aliron al kultura heredaĵo kaj al sciencaj novaĵoj, sed precipe – por plibonigi la mondon. Sed tio ne plu estas demando de lingvistiko.

La citaĵojn el verkoj de Komenio mi elpruntis el la tradukoj de V. Novobilský kaj O. Kníchal, prezentitaj dum la Seminario pri Komenio, Prago, 1992 kaj eldonitaj per ĈEA, 1992.

Literaturo

- Barandovská-Frank, Věra** (1995): *Enkonduka lernolibro de interlingvistiko*, Editura Univ. din Sibiu
- Duličenko, Aleksander** (2006): *En la serĉado de la mondlingvo aŭ interlingvistiko por ĉiuj*, Sezonoj, Kaliningrado
- Formizzi, Giordano** (2009): *La kulturaj radikoj de Esperanto: la pedagogio de J.A.Komenský*, prelego dum 82-a kongreso de SAT, Milano
- Grulich, Tomáš** (2009): Pojetí dokonalého jazyka u Komenského a Leibnitze [Koncepto de perfekta lingvo ĉe Komenský kaj Leibnitz], in: *Philosophical E-journal of Charles University*, eld. Charles University, Prague
- Hendrich, Josef** (?): Jan Amos Komenský, trad. Jana Cíhová, in: *Norda Prismo*, 57/4, p. 206-209
<http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Revuoj/np/np5704/komensky.html>
- Internacia seminario pri Komenio*, Prago, 1992, eld. ĈEA:
 V. Barandovská-Frank: Komenio kaj internacia lingvo,
 Vlastimil Novobilský: Interlingvistikaj konceptoj de J.A.Komenský
- Kníchal, Oldřich** (1974): Komenio kaj la internacia lingvo, ĈEA, Prago
- Komenio: Vojo de Lumo** (Via Lucis), trad. Jaroslav Mařík, ĈEA, Prago, 1992
- Mráz, Jaroslav** (2002): *Komenio – anĝelo de la paco*, prelego dum Kongreso de Asocio de Esperantistoj-Handikapuloj
- Pechan, Alfonso** (1966): *Gvidlibro por supera ekzameno II*, Hungara Esperanto Asocio, Budapeŝto

Ricevita 2014-11-15

Adreso de la aŭtoro: Ing. Jindřich Košťálek, Dominikalni Paseky 86, CZ-26223 Jince, email: kostalek@esperanto.cz

Comenius and Zamenhof – brief comparison of their planned languages (Summary)

It is highly unlikely that L. L. Zamenhof, the creator of Esperanto, was acquainted with the works and thoughts of J. A. Komenský (Comenius), Czech pedagogue and linguist of the 17th century, about international language. Nevertheless, studying some of the works of Comenius and comparing his ideas and basic proposals for his "universal language" with the grammatical rules and morphology of Esperanto, one gets the impression that the both authors knew each other and discussed the linguistic issues. The article tries to describe where the basic ideas for the structure of the "universal" (Comenius) or "international" (Zamenhof) languages were identical or similar and where they were different (if so).